

# Heroldo de Ĉinio

■ DUONMONATA GAZETO ■

■ 中國報導半月刊 ■

**ABONMANIERO** Ni ne fiksas abonprezon al tiu ĉi gazeto, sed kun danko akceptas laŭvolan donacon. Legantoj kiuj volas regule ricevi nian gazeton almenaŭ pagu la afrankon—usona \$0.25 aŭ 5 respondukupoj por 1 jaro. Ni tamen esperas ke multaj s-anoj pagos pli por ke ni povu daŭrigi la regulan aperigon. Ĉni pagu al nia administracio aŭ prefere sin turnu al nia peranto: S-ano Allan C. Shain, 37 Hopetoun Parade, Box Hill 11, Victoria, Aŭstralio.

Adreso de l' Red. k Adm:  
P. O. Box No. 175,  
Chungking, Ĉinio.  
通訊處：重慶郵箱一七五號



# Mesaĝo al Amikaj Nacioj

*Generalisimo Chiang Kai-shek eldonis la jenan mesaĝon al amikaj nacioj je la tria datreveno de la komenco de la rezistmilito:—*

Hodiaŭ estas la tria datreveno de la tago je kiu Ĉinio komencis rezisti la militan invadon de Japanio. Mi deziras je tiu ĉi okazo paroli al niaj amikaj nacioj pri la vidpunkto de la ĉinaj registaro k popolo rilate al la ĉina-japana milito k la monda situacio.

## Komenco de Rezistado

1. De la komenco mem de Rezistado ni vidis ke la amplekso de nia batalo ne nur limiĝas sin al la defendo de la ekzistado k sendependeco de Ĉinio; ĝi ankaŭ prezentas servon de plej granda valoro al estonta mondordo k homa prospero. La lastatempaj grandaj ŝanĝoj en la eŭropa situacio plene pruvis la plenan akuratecon de tiu ĉi nia kredo. La japanaj militaristoj jam longe dorlotis la ambicion de mondkonkero, k ilia atako al Ĉinio estas nur la unua paŝo en ilia tuta programo de invado. Se Ĉinio ne estus batalinta dum la pasintaj tri jaroj, Japanio estus jam frue utiliginta la oportunon troveblan en la eŭropa milito per rekta atako al la teritorio k rajtoj de niaj amikaj nacioj sur la pacifika bordo. Tamen nun, Ĉinio, malgraŭ siaj mankoj en milita ekipiteco jam per la unueca spirito de decidemo k sinoferemo, batis Japanion en tri jaroj preskaŭ ĝis la punkto de konsumiĝo k disfalo. Agante kontraŭ la obstina rezistado de Ĉinio, Japanio iom post iom elĉerpas sian militan k ekonomian forton, dum ĉiam pli malkreskas la batalspirito de ambaŭ la japanaj popolo k armeo. La rezulto estas ke Japanio nun jam perdis la povon agi kiel reĝanto de pacifikaj aferoj, k ĉiuj

japanaj planoj de konkero fariĝis ne realigeblaj. Ni povas nin gratuli je tiu ĉi fakto kio estas ne malpli kontentiga al amikaj nacioj ol al ni mem.

2. Kiam rezistado jam akiris la efikojn kiujn mi ĵus priskribis, ĉiam pli kreskas la fido de nia tuta nacio je la estonteco de la milito. Dum la pasinta jaro, tiaj estis la rebatoj suferitaj de la armitaj fortoj de la japanaj militaristoj ke ili sin turnis al politikaj intrigoj, esperante per dungo de pupoj frakasi la unuecon de nia popolo. Depost la malkaŝo de la tiel-nomata "Kondiĉoj por la Reĝistigo de Rilatoj inter Ĉinio k Japanio" aŭ privata kontrakto konkludita de Wang Ching-wei kun la malamiko je decembro 30 de la lasta jaro, eĉ infano inter ni jam fariĝis konscia pri la

senhontaj perfido k hipokriteco de la japanaj motivoj. La unuanima solidareco de la ĉina nacio fariĝis des pli forta, k la ĉina popolo des pli abomenas tiajn perfidon k hipokritecon. Tio ĉi estas videbla al ĉiuj observantoj ambaŭ ĉinaj k fremdaj. De nun japanaj timigoj k intergoj ne povas plu bari la vojon de tiu ĉi batalo por nia nacia sendependeco k monda justeco. Ĝis la malamiko tute forlasus sian invadpolitikon k retirus siajn fortojn el nia tero, rezistado neniam ĉesas. Tion ĉi mi sentas ke mi povas solene deklari en la nomo de miaj registaro k popolo, en tiu ĉi nuna mesaĝo al civitanoj de amikaj nacioj.

## Dum Pasintaj 3 Jaroj

3. La simpatio k helpo kiujn donis amikaj nacioj al Ĉinio dum la pasintaj tri jaroj impresis al nia popolo senton de ŝuldo kiun ili neniam forgesos. En tiu ĉi rilato mi havas du punktojn kiujn mi volas diri malkaŝe al miaj legantoj:

Unue, milite k ekonomie Japanio jam estus ĵetita en marĉon el kiu ĝi ne povas sin liberigi. La hodiaŭa Japanio estas senpova por militi al ajna nacio. La timigoj kiujn ĝi lastatempe faris al Nederlanda Orient-hinda Insularo,



Ludo de Wang Ching-wei sub la direktado de la japana militisto.



Knabino alportinta teon.

Lignogravuo de Sinpo

Hindo-Ĉinio k Birmo estas nenio pli ol ĉantaĝoj por atingi siajn oportunistajn celojn sen uzo de milito. Agu la potencoj kontraŭ tiaj timigoj kun klarvido k decidemo, dum ili kunlaboru elpensi efikajn rimedojn por bremsi invadon. Tiel ili faros moralan k leĝan respondecon kontraŭ Ĉinio k la Malproksima Oriento. Estas la devo de ĉiuj amikaj nacioj tiel defendi la estontan ordon de la mondo. Ĉe la eksplodo de la Mukden Incidento estis kelkaj inter la registaroj de amikaj nacioj, kiuj hezitas k malakordas inter si, k tiu ĉi senago rezultigis la nunan staton de senordo reganta en la mondo. Se amikaj nacioj nun traktas la japanajn timigojn al Hindu-ĉinio, Birmo, k la Orient-hinda Insularo kun la sama indiferenteco aŭ toleremo, la rezulto estos nepenseble grava. Ĉinio, siaflanke, ne hezitos opaci per forto iajn ajn estontajn invadagojn de la japanoj en Hindu-Ĉinio aŭ aliaj aziaj areoj, ambaŭ por sia propra sekureco k por la efektivigo de sia fiksita politiko de rezistado kontraŭ invado. Ĉar, fakte, ĉiuj agoj de Japanio nun havas kiel la centran motivon la detruon de nia nacia ekzistado k sendependeco.

### Materiala Helpe Bezonata

Plie, malgraŭ la eŭropa milito, Sovetio k Usono ankoraŭ ne

involvigis k havas tial plenan liberecon klopodi por favori al Ĉinio k opoziti al Japanio. Tia ago, mi kredas, prezentas ne nur la agdevon sed ankaŭ la respondecon k rajton de tiuj du landoj. Japanio precipe dependas de Usono por la livero de ĝiaj militaj k ekonomiaj bezonaĵoj. Tio ĉi estas universale konata. La lastatempa efektivigo de embargoleĝdono fare de la Usona Kongreso indikis la popolan postulon por sankcioj kontraŭ Japanio. Se Usono k Sovetio povas fari taŭgajn paŝojn por provizi Ĉinion per materiala

helpe, sendube oni povas frue likvidi k stabiligi pacifikajn aferojn tiel, ke ĝi ne nur profitos al Ĉinio sola.

4. Fine, rilate al estontaj evoluoj en la mondsituacio, ni povas ion diri emfaze. Tio estas: por la sukceso de estontaj klopodoj por mondpaco estas necese ŝanĝi memsufiĉan k proksim-vidan penson favore al la ideo de kunlaboro inter ĉiuj pacamaj nacioj por la kreo de forta internacia organizo konstruita laŭ efika sistemo de kolektiva sekureco. La sperto de la lastaj du montoj akirita de la eŭropa milito kondukas nin al la penso, ke sen efika organizo de kolektiva sekureco inter la nacioj de la mondo, ne nur al malgrandaj k malfortaj nacioj, sed eĉ al grandaj k fortaj, mankas garantio por ilia sekura ekzistado. Tiun ĉi lecionon ni devas memori k neniam forgesi. Ni devas utiligi ĉian taŭgan oportunon por realigi tiun ĉi celon. Farante tiun ĉi apelon, mi parolas por miaj kvarcent k kvindek milionoj da ĉinaj popoloj, kiuj volas strebi kune kun la civitanoj de ĉiuj amikaj nacioj al tiu ĉi celo, por la starigo de eterna paco en la mondo k la pliiĝo de la prospero de la homaro.

(resumis Minz)

### Altgrada Eduko Daŭras

Cent k unu institucioj de altgrada eduko, inkluzive 37 kolegioj, k universitatojn, 35 institutojn k 29 teknikajn lernejojn, funkcias en diversaj partoj da Ĉinio, laŭ la Ministerio de Eduko.

El la 101 ekzistantaj institucioj por altgrada eduko en Ĉinio, 35 estas naciaj, 19 estas provincaj k 47 estas privataj.

Du trionoj el ili moviĝis al la interno post la komenco de la milito. Dekses el tiuj tridekdu trovis siajn novajn hejmojn en Szechuan provinco, sep en Yunnan, tri en Kwangsi k po du en Shensi, Kwiechow k Hunan. Nur unu institucio, Lingnan Universitato, estis provizore translokita al Hongkong el sia origina sidejo en Canton.

Dekses institucioj estis devigitaj evakui al pli sekuraj lokoj en siaj provincoj, dum 28 aliaj ankoraŭ funkcias en la okupataj areoj. El la lasta grupo, 21 estas en Shanghai, ses en Peiping k unu en Tientsin.

Naŭ institucioj de altgrada eduko establiĝis en la interno antaŭ la milito. Kvar el ili lokiĝas en Szechuan, k po unu en Kwiechow, Yunnan, Kwangsi, Kansu k Sinkiang provincoj. Dek kvin aliaj estis nove malfermitaj aŭ remalfermitaj, kvin el ili lokiĝas en Shansi, du en Szechuan, po unu en Hunan, Kansu, Chekiang, Shansi, Shanghai k Tientsin.

(A. V.)



# MESAĜO AL LA ARMEO K POPOLO

Okaze de la komenco de la kvara jaro de la milito, la Generalisimo eldonis inspiran mesaĝon al la ĉinaj armeo k popolo. La ĉina gvidanto ankoraŭfoje rememorigas siajn popolanojn pri la signifo de la nuna milito, nome ke ĝi estas ne nur por protekti la ĉinan nacian ekziston sed ankaŭ mondordon homan civilizon. Tial li admonas al sia popolo duobligi siajn klopodojn por sukcese fini la historian batalon. Li emfazas ke la celo de la ĉina registaro estas la kompleta retiriĝo de la japanaj trupoj el tiu ĉi lando k la restarigo de ties teritorio k administra integreco. Rilate al la japana nacio Ĉinio havas nenian malamon.

Revuante la eventojn de la pasinta jaro, la Generalisimo diris ke rilate al milito la malamiko jam perdis la iniciatemon por atako k jam turnis al defensivaj rimedoj pro nia magneta strategio. Escepte de Nanning ĝi neniam gajnis aŭ starigis sin firme en iu ajn strategia punkto. Male, ĝi suferis multajn rebatojn. Evidente, la manko de nacia politiko k konkretaj militaj celoj estas la kaŭzo de la spirita disfalo de la japanaj trupoj

## Politika Rekonstruado

Rilate al politikaj aferoj, la Generalisimo redeklaras ke la fiksita celo de la politika rekonstruado de Ĉinio estas la firma establiĝo demokrataj institucioj kun ampleksa bazo en la kamparaj distriktoj. Komparante la politikan evoluon de Ĉinio k tiun de Japanio, oni devas konstati ke Ĉinio en la daŭro de la nuna milito antaŭeniras laŭ demokrataj principoj, dum Japanio abandonas iom post iom jam dekadencan parlamentan reĝimon k revenas rapide al la stato de anarkio.

Rilate al ekonomiaj aferoj, Ĉinio nun plene pretas por ebla japana blokado k sendependa disvolvo de siaj propraj riĉfontoj. Se la malamiko blokadus nin antaŭ unu jaro, ni renkontus malfacilaĵojn. Sed nun la lando povas produkti ĉiajn armilojn k municion kiajn ĝi bezonas por daŭrigi la militon k jam starigis fortikan fundamenton por industria disvolvo. Fakte, la malamika blokado povas nur doni al ni plian stimulon por produktaj k kreaĵentreprenoj.

Sin turnante al la internacia situacio, la Generalisimo diris ke nun kiel ĉiam Ĉinio estas stabiliga faktoro en la Malproksima Oriento. Nia fremda politiko restas senŝanĝa k nia sinteno estas firma. Tio ĉi gajnis al ni multajn amikojn

kiuj donis al ni aŭ moralan subtenon aŭ materialan helpon. Aliflanke, Japanio, ŝanĝante sian politikon tiel ofte kiel ŝanĝiĝas la monda situacio por fiŝi en malkvietigita akvo, trovas sin pli izolita ol antaŭ unu jaro.

## Averto de la Generalisimo

Poste, la Generalisimo avertas al sia popolo, ke se sukcesus la malamiko ni ne nur estus konkeritaj kiel ŝtato sed ankaŭ ekstermitaj kiel raso. La japana kuraĝigo de malbonfaroj k uzo de narkotikoj en okupataj areoj indikas ke ili decidis detrui ne nur Ĉinion sed ankaŭ la ĉinan popolon. Por eviti tiun ĉi katastrofon, la Generalisimo diras ke la tuta nacio devas sin pretigi por labori pli pene laŭ la sekvantaj vojoj:—

- (1) Efektivigi spiritan mobilizon.
- (2) Plene subteni la militan programon de la registaro per aktiva partopreno en la milito.
- (3) Plene subteni la politikan programon de la registaro per reorganizo de distrikta administrado.
- (4) Plene subteni la ekonomian programon de la registaro per plimultigo de produktado, akcelado de ŝparado k disvastigo de kooperativaj organizoj.
- (5) Plene subteni la fremdan politikon de la registaro per plenumo de ĉies devo por gajni la respekton de la mondo.

Fine, la Generalisimo rememorigas sian popolon, ke ilia misio estas ne nur rezisti Japanion sed ankaŭ savi Ĉinion k la Malproksiman Orienton k eventuale la mondon el la detruaj fortoj. La tasko de la nuna generacio devas esti akceli la daŭran feliĉon de ambaŭ Ĉinio k la homaro.

(resumis *Minc.*)

## Bona Rikolto Atendata

Alia bona rikolto por libera Ĉinio estas atendata de la Nacia Agrikultura Esplora Buroo, kiu dazis sian profetaĵon sur raportoj alsenditaj de miloj da siaj korespondantoj disigitaj tra la tuta lando.

Pro la printempa sekego tra tuta Ĉinio, la someraj rikoltoj de 1940 donos ĉirkaŭ 70% ol tiuj de plena rikola jaro. Ĝustatempa kluvo en frusomeraj monatoj savis la situacion ĝis konsiderinda mezuro. Escepte de Kansu, Shensi k Honan, kiuj rikoltos ĉirkaŭ 60% ol en plen-rikolta jaro, la cetera lando produktos pli ol 70% de sia produkt-povo-

(A. F.)

## LA MILITA SITUACIO

Laŭ Revuo de Generalo Chen Cheng

Kiel frue la ĉinoj lanĉos ĝeneralon kontraŭofendon?

Respondante la demandon en speciala memoriga artikolo je la tria datreveno de la milito, Generalo Chen Cheng, Direktoro de la Politika Departemento de la Nacia Milita Komisiono k veterana komandanto, diris:

"Lastatempe kelkaj pensis ke ĉar la malamiko jam atingis la etapon de konsumiĝo, ni devas kapti la oportunon lanĉi ĝeneralan kontraŭofensivon por repreni ĉiujn perditajn teritoriojn. Tia ideo devas esti korektata. Ni nature esperas akiri nian finan venkon kiel eble plej baldaŭ, sed ni devas rekoni ke por venki japanan imperialismon, laŭsupoze unuaklasan potencon, necesas pli ol unu aŭ du kontraŭ-ofensivoj aŭ unu aŭ dumonata operacio. Ni devas tial allasi du aŭ tri pliajn jarojn da preparado.

Generalo Chen estas optimisma pri la milita situacio. "El la milito de la lastaj tri jaroj, estas evidente ke ni jam transiĝis de pasiva al aktiva rolo k de defensiva al ofensiva pozicio, kio indikas ke nia strategio jam sukcese fiaskigis la esperojn de la malamiko 'venki Ĉinion sen milito', 'gajni rapidan k decidan venkon', k 'trakti pri paco k fini la militon'.

La militforto de Ĉinio plifortiĝis de la daŭro de la milito, daŭrigas Generalo Chen Cheng. Dum antaŭe Ĉinio havis 1,000,000 virojn sur la batalkampo, la nuna nombro estas pli ol duobla. Samtempe, pliboniĝis la batal-spirito, tekniko k armiloj k municio de la Ĉina Armeo.

Kia estas la malamiko? Antaŭ la Lukoŝiao Incidento, la malamiko esperis esti kapabla disbati Ĉinion en unu semajno per tri divizioj da trupoj. Poste, ĝi ŝanĝis sian planon, kredante ke per uzo de 15 divizioj Ĉinio

povos esti konkerita en tri monatoj. Tamen, oferinte pli ol 1,500,000 virojn (inkluzive la mararmean, landan k aeran fortojn) mortigitajn k vunditajn en trijara milito, Japanio ankoraŭ malsukcesis disponi pri la "Ĉinio-Incidento".

Generalo Chen malkaŝas ke pro la manko de laboro k interna malkvieto en Japanio, la japana komando estis devigita demobilizi kvar diviziojn k resendi ilin lastprintempe. Li aldonas ke la dilemo antaŭ la japanoj nun estas de la nombro de trupoj disponeblaj por batali en Ĉinio atingas la saturan punkton k sekve grandskala refortigo estas necbla, malhelpante al Japanio profiti de la eŭropa situacio.

Estas aliaj kialoj de optimismo, laŭ Generalo Chen. Unue estas la vera kunlaboro inter la trupoj k civiluloj. Ekzemple, la kamparanoj en suda Hupeh en 1938 konstruis 300 milojn landvojon por la ĉina armeo en iom pli ol unu semajno, ebligante la transporton de miloj da vunditaj oficiroj k soldatoj al la bazhospitaloj. La lastjaraj venkoj en norda Hunan k norda Kwangtung estis grandparte pro la kunlaboro de la popolamasoj.

Helpon oferas la kamparanoj en variaj formoj. En la rilato de nutraĵo, ili ne nur translokas ĉiom da rikoltaĵoj sed ankaŭ ĉiajn ilojn kiaj ŝton-mueliloj, kiujn la alvenantaj invadantoj povos uzi. Ili forprenas ĉiajn vestmaterialojn, surgluas afiŝojn intencatajn por submini la batal-spiriton de la japanaj trupoj, detruas ĉiujn vojojn, k helpas la ĉinan armeon transporti provizaĵojn, porti vunditojn, kolekti informojn k agi kiel gvidistoj.

Dua kontentiga faktoro estas la spirito de batalemo k ofendo de la junaj milit-laborantoj ĉe la fronto. Sen la laboro de la 3,000

membroj de la militserva korpuso kiuj trejniĝis k organizis la civitanojn de Wuhan, la ĉina retiriĝo el la urbrtio ne estus tiel glata. Dum la suda Hupeh batalo, la junaj militlaborantoj establis akceptajn staciojn k ripozajn staciojn, provizante vunditajn soldatojn k rifuĝulojn per teo k manĝaĵo. Dumil Kwangtung studentoj faris similan servon dum la granda batalo en la provinco en lasta decembro.

Notinda estas la serv-spirito de gejunuloj kiuj travivis militentemajn trejnon. Ekzemple, pli ol 20,000 tiaj gejunuloj, nun sin okupantaj per politika laboro en la armeoj, ricevas nur \$20 pomenate—multe malpli ol kiom akiras simpla soldato. Tamen, ili faras la laboron senplende.

La plej granda japana malfortaĵo ĉe la fronto avantaĝa al Ĉinio estas la universala militenuo kiu trapenetas la vicojn de la japana armeo. La fakto ke la japana komando intensigas sian "pacigan" laboron inter siaj oficiroj k soldatoj vidigas la gravecon de la antimilita sentimento.

Pli ĉagreniga al la japanaj militaristoj estas la ofta ribelo de pupaj trupoj. En tiu ĉi rilato, Generalo Chen rememorigas ke ĉinaj trupoj kiuj malsukcesis retiriĝi ĝustatempe el Nanking en decembro, 1937, estis senarmigitaj k reorganizitaj en tri "regimentojn" de la japanoj. Tri-jare ili estis trejnataj por esti lojalaj al siaj novaj mastroj. Tamen, tuj kiam ili estis senditaj al Fukien, ili ekribelis entute k nun denove batalas ŝultro ĉe ŝultro kun ĉinaj regulaj trupoj.

Malgraŭ la multaj faktoroj malavantaĝaj al la japana invadanto, Generalo Chen ne kredas ke la malamiko forlasos sian politikon superregi Ĉinion sed anstataŭe profitos de la eŭropa milito por intensigi siajn militan, politikan k kulturalan ofensivojn. Li konsilas decidemon, persistecon k memfidon por sukcese penumi la duoblan taskon de rezistado k rekonstruado, k konkludas per la sugesto ke rekonstruado devas koncentriĝi ĉirkaŭ nacia defendo.

# Kaj Montoj Ne Ebeniĝis, Ebena Ne Kavigiĝis!

Mi memoras pri la tagoj de junio, dum kiuj Ĉinkino estis kuŝanta sub la bombopluvo kaj maŝinpaŝado de la japanaj armilistoj. Bombardo por ni ne estas mirinda afero, ni ĝin jam spertis dum jaroj; sed mi volus atentigi la mondon pri tio, kio okazas nun en Ĉinio, dum ankaŭ Eŭropo estas en la milito, kiun kreis.....la imperiismo.

Matene post la naŭa, kun plumo sidis mi en la sidejo de Ĉina Esperanto-Ligo, farante respondon al iu samlingvano malproksime loĝanta. Subite mi aŭdis el la strato la krion: "La ruĝa signo! la ruĝa signo! rapidu! ....." Kaj ankaŭ fajfiloj ekalarmis aeratakon. Revenis tuj al mi la memoĝo pri la famo ke baldaŭ komenciĝos japana bombardado por tutaj kvar tagoj. Mi formetis la plumon, senprokraste ordi-

gis, ensakigis ĉiujn gravajn dokumentojn de la Ligo, ilin kunprenis, k iris eksteren.

Torentoj tra la stratoj! Mare homoj elfluis el ĉiuj stratoj k stratetoj de la monta ĉefurbo, rikŝoj, portseĝoj, aŭtomobiloj, senvestaj piedoj, kvazaŭ cent brigadoj ekmoviĝis, de unu bordo de Jangez al la alia, trans unu monton, du, kaj pli, al la naturaj ŝirmejoj kontraŭ la bombkatastrofo. Kelkaj sin ŝovis en la urbajn kavernojn, mi ankaŭ kun tiuj kune.

"Aŭdu!....."


Io komencis brui ĉe la horizonto. Laŭtiĝis, proksimiĝis. Babilado en kavernoj eksanĝiĝis en silenton. Infano demandis la patrino: "Ĉu bomboj?"—"Ne, mia trezoreto, sed silentu, panjo cin gardas!" flustre diris la malriĉa juna patrino.

"Jen ĝi!....." Ekestis impresata teruro. Ĉiuj ekkunpremiĝis, oni aŭdis la tre klaran, fortan sibladon de la detruiloj frotiĝantaj kun la aero;—tondro kaj fulmo!!!..... Momente ni en subkonscio distingiĝis la unuan eksplodon, la duan, sed poste plu neniu apartan; tuta daŭro de centfoje pli densa bombopluvo! kaj aero ŝturme impetis en la kavernon, kvazaŭ furioza manego volus iujn el ni forkapti, la kaverno forte skuigiĝis kiel lada skatoleto. Morto! morto!.....

Mi promenis, inter la pasintaj horoj kaj la venontaj, de strato al strato, revuis kun pli malpli da atentemo la novajn aspektojn de la ĉefurbo. Ie domoj detruigiĝis, ie butikoj dispeciĝis, ie librejoj ruiniĝis, paperfolioj kun tiaj kaj aliaj tekstoj kovris la vojjon, en iu strata kruco sidis bombo ankoraŭ ne eksplodiĝinta..... Fumkolonoj levis sin kaj turniĝadis en la aero, fajrotaĉmentanoj, sekurgrupanoj, policistoj, are svarmadis tien-ĉi tien, pumpiloj, veturiloj, sonoriloj, kaj tiel plu.....

Konstruante  
antibomban  
fosajon.

de Li Hwa





# Japana Bombardo Estas

## Memmortiga Paŝo

Denove en la urbon revenis la homtorentoj. Ili bruis, kriis, senfine elparoladis siajn aventurojn, demandis kaj respondis pri informoj de la katastrofo: Kie? kaj kiel? kaj kiuj?

Ne povis ne esti perdoj de homoj k objektoj, post tia freneza dramo! Se ili ne falis sur tiujn, ili jam aliajn tuŝis aŭ trafis! Momentoj kaj horoj por ĝemi, plori, kaj blasfemi, certe ne malestis, tio estis nepra. Revenante hejmen kelkaj plu ne trovis sian loĝejon, nek siajn parencojn..... Virinoj jam ne povis sin teni de korskuo k ekploris; viroj sin ĵetis en teruran indigniĝon.....

Sed baldaŭ ĉiuj konsciigis kaj serĉis iajn rimedojn. Unuj decidis iri vilaĝen aŭ ĉirkaŭen de la urbo, aliaj—gardi sian postenon kiel antaŭe. Kaj en ĉiu angulo vi vidis energion vigliganta, kreskanta, novnaskiganta. Teknikistoj kun diversaj iloj ĉie aktivis. Konatoj diskutis kun entuziasmo: "Nu, kiel? neni ŝanceliĝas! Ĉinio havas bonan memorpovon kaj scias kio estas ĉio!"

Nokto venis, kun plitrankviliĝinta sento la mont-urbo spiris freŝan aeron. Vunditoj endormiĝis, rifuĝantoj kuŝis ie en halo aŭ kabano, mortintoj tuj havis ripozejon en la tero. Se estis ankoraŭ mizera malplaĉa cirkonstanco, ĝi servis ankaŭ por pluen konduki la popolon al la vekigo kaj firma volo de la batalo.

Mi rapidis hejmen, elektra lampo brilis kiel ordinaro en la domo. La portreto de Zamenhof kiel antaŭe direktis la rigardon al la malproksimo kvazaŭ ĝi estis

### PLENA MALKAŜO DE JAPANA AMBICIO

Teksto de Wang-Japana  
Sekreta Interkonsento

havebla ĉe la Adm. de Heroldo de  
Ĉinio kontraŭ unu res. ondskopono.

Publikigante unuafoje interesan statistikon pri la lastaj 12 japanaj aeratakoj al Chungking de majo 20 ĝis junio 16, alta komandanto de la ĉina aerforto taksis la entutan japanan perdon, ne inkludante la damaĝon al aeroplanoj, je US \$11,030,000 kompare kun la ĉina perdo de US \$461,800.

El la 1,177 malamikaj aeroplanoj (la nombro estas adicie kalkulita dum 12 fojoj) kiuj partoprenis en la 12 aeratakoj al la milittempa ĉefurbo, 29 estis paffaligitaj, dum 50% estis damaĝitaj ĉigrade. Krom la 29 malamikaj maŝinoj kies rompaĵo estas jam eltrovita, almenaŭ 40 aliaj diskreis pro difektoj suferitaj dum aerbataloj.

La alta komandanto konfesis ke la ĉina aerforto perdis kvar flugmaŝinojn k unu piloton. Entute naŭ ĉinaj aeroplanoj estis damaĝitaj k du ĉinaj pilotoj estis vunditaj.

serĉanta tie ian strangan vidaĵon de la mondo. Mi sidigis kaj prenis plumon, elsakigis la dokumentojn.

"Bonan vesperon, kamarado!" Venis kelkaj el la esperanto-kursanoj. "Ankoraŭ kun la manoj kaj piedoj?"

"Ankoraŭ kun la kapo, kiel ĉiam!" mi respondis.

"Aŭskultu, la malamika radioparolanto anoncas ke ili, en tuj sekvantaj tag-noktoj, bombardos Ĉinkinan monturbon ĝis ebeniĝo!"

"Kredeble, se tiuj best-imperiistoj havus sufiĉe da bomboj."

Tio okazis la dekduan de junio. En postaj tagoj la samo ankoraŭ daŭris ĝis antaŭ ne longe, sed, antaŭ ol la japana bombar-

Ĉinaj civilulaj domoj detruitaj aŭ bruligitaj pro uzo de incendiaj bomboj nombras je 880. Meznombro ĉiu ĉina domo estas valorita je US \$400.

La alta komandanto taksis ke ĉiu japana aeroplano—peza bombardmaŝino—kostas US \$200,000 k portas 1,000 galonojn da aviada gaso (plus motor-oleo) po US \$1 por ĉiu galono k 1,000 kilogramojn da bomboj po US \$2 por ĉiu kilogramo. Meznombro, ĉinaj aeroplanoj—batalmaŝinoj—kostas ĉiu US \$35,000. Por la trejno de aerbatalanto—ambaŭ ĉina k japana—proksimume US \$20,000 estas bezonata.

Supoze ke ĉiu japana peza bombaeroplano estas manumata de sep personoj, la alta komandanto diris ke la malamiko jam perdis ĉirkaŭ 500 virojn krom aro da aliaj vunditaj en aerbataloj.

(A,V.)

dilaro sukcesus detrui kvaronon de Ĉinkino, ĝi tamen ekpreferis ripozeton.

Ĝi sendis hieraŭ novan radicanoncon. "La monta Ĉinkino fine jam fariĝis ebena, ni iros kavigi la surebenan Ĉengtu....."

"Humora propagandisto!" kaj ni ege ekridadis.

En la komenco de julio, antaŭ la tria datreveno de la Reziŝtbatalo, matene mi promenas tra la ĉefurbo, tra la vicjoj de la ĉiam bruantaj homtorentoj, tra la ŝvitantaj, laborantaj kulioj, tra tiu sennombra gefrataro, mizere vivanta, sed heroe batalanta, esperplena

Mi rigardas ilin kaj ĉirkaŭen de mi,—kaj montoj ne ebeniĝis, ebena ne kavigis!

—(Ŝ)

## Antikva Militareno

### Vidas Novan Batalon

Furioza batalo okcidente de la Han rivero renovigas antikvan militarenon. La sektoro inter Hsiangyang, Fancheng, Kingmen, Tangyang, Shasi, Kiangling (Kingchow), k Ichang, Sceno de nunaj bataloj, estis la nacia batalkampo tra la jarcentoj.

Ichang, la trairejo inter Szechuan k Hupeh sur la Yangtze riverbordo, jam vidis ferhufojn, aŭ prefere kiras-jonkojn, pasi k repasi tra la urbo k ties akva fronto. Ichang k ties proksimo vidis sian plej grandan batalon en 222 P.K., kiam Reĝo Liu Pei de la Reĝlando de Shu estis venkita en sia aborta atako al la Reĝlando de Wu pro venĝi la morton de sia ĵura frato, Kwan Kung.

Liaj soldatoj, ĉirkaŭ unu miliono, postenis laŭ la Yangtze rivero je distanco de ĉirkaŭ 400 kilometroj. Per saĝa flankuma movo k fajr-atako, la Wu soldatoj bruligis la Shu tendaron k dispelis la armeon. Reĝo Liu Pei mortis tuj poste ĉe Peiticheng apud la Yangtze sur la Szechuan-Hupeh limo.

Ichang urbo estis unue konstruita en la Han dinastio (206 A. K.-220 P.K.) k estis konata kiel Yiling konteo. Ĝi estis farita internacia komerca havenurbo laŭ la Ĉina-Brita Chefoo Traktato konkludita en 1876. Ĉiujara negocifero por tiu ĉi Yangtze urbo estis \$500,000 antaŭ la nuna milito.

Sesdeksep kilometrojn laŭ landvojo nordoriente de Ichang estas Tangyang, ilia antikva batalkampo de la epoko de la Tri Reĝlandoj (180-280 P.K.). Antaŭ ol Liu Pei starigis sin en Szechuan, li

estis elpelita el suda Honan en 206 P.K. de Tsao Tsao, la ĉefministro de la Han dinastio. Li k liaj soldatoj fuĝis suden laŭ la Han rivero. La rajdistoj de Tsao enpremis sin al ili ĉe Tangyang. Tie, Chao Yun, unu el la plej bravaj generaloj de Liu, batalis sola kontraŭ la armeo de Tsao provante savi la filon k edzinojn de Liu. Li rompis k rerompis la fortan kordonon de Tsao sepfoje serĉante sian trijaran

mastron k sukcesis elporti la etan princon sen vundeto. Lia Tangyang batalo fariĝis legendo en ĉina historio.

Kvindek ses kilometrojn oriente de Tangyang estas Kingmen, alia strategia urbo sur la okcidenta bordo de la Han Rivero. Ĝi estas la landa trairejo al Ichang. Ĉirkaŭata de montetoj, ĝi estas natura protekto al Ichang distrikto k al Hsiangyang k Fancheng en la nordo. Kiam kiras-jonkoj trabatalis sian vojon supren k malsupren de la Yangtze pretervoje de Ichang aŭ la Han rivero pretervoje de la urb-duo de Hsiangyang k Fancheng, infanterio k kavalerio ĉiam marŝis tra Kingmen k Tangyang. La Kin Shan Montaro, kie okazis furioza batalo inter la ĉinoj k japanoj, estis batalkampo por antikvaj militistoj konkurantaj por regpovo

### Geriloj Planas Ekonomian Militon

Inter la partizanoj k movemaj batalantoj aktivaj en la diversaj militareoj estas speciala grupo de homoj kiuj sin nomas "ekonomiaj gerilanoj". Ili disigis en etaj grupoj post japanaj linioj sin okupante per ekonomia milito kontraŭ la malamiko.

La organizo de la ekonomiaj geriloj komenciĝis antaŭ unu jaro, iniciatite de la Militarea Komisiono de Partiaj k Politikaj Aferoj. La reguloj pri la organizo k aktiveco de tiuj ekonomiaj geriloj estis aprobitaj k suplementitaj persone de Generalissimo Chiang Kai-shek.

Laŭ tiuj reguloj, speciala oficejo konata kiel la ĉefstabejo de la ekonomiaj geril-unuoj estas alligita al la milita ĉefstabejo de ĉiu militareo, kun la ĉefkomandanto de la armeo aganta kiel la ĉefdirektoro. Membroj de la Militarea Komisiono de Partiaj k Politikaj Aferoj postenantaj en la diversaj militareoj agas kiel vic-direktoroj. Tiuj el la armeaj oficiroj kun ekonomia scio servas kiel konsilistoj.

La ekonomiaj geril-unuoj konsistas el du grupoj de homoj. Estas soldatoj, gerilanoj k Paoantui (pac-garda korpuso). La alia grupo konsistas el tiuj kiuj sin okupas per diversaj produktaj laboroj, kiaj la terkulturistoj, laboristoj, kolportistoj k komercistoj kiuj organizis sin en memprotektajn korpusojn aŭ aliajn specojn de popola milico.

Tiuj grupetoj povas facile enfiltriĝi post malamikajn liniojn k malkvietigi la japanojn. Ilia laboro estas ĉefe detrua, k ĉio kio havas ekonomian valoron al la malamiko k kion ili ekvidas estos detruata. Ilia taktiko varias kun la loko en kiu ili laboras k kun la celaĵo kiun ili decidas detru.

La rezultoj de la ekonomia milito, precipe en suda Anhwei, Kwangtung k Hunan, estas tre kontentigaj. Dank' al la klopodoj de la ĉinaj ekonomiaj geril-unuoj la operacioj en la japanaj karb- k ferminoj proksime de Tangtu en suda Anhwei estas ofte interrompitaj.

(A. V.)



super la distrikto okcidente de la Han rivero.

Laŭlonge de la Yangtze, la du trairejoj al Ichang estas Shasi k Kiangling. La du urboj estas nur 8 kilometroj for unu de la alia, ĉirkaŭ 235 kilometrojn oriente de Ichang. Shasi estas traktata havenurbo, malfermita en 1895 konforme al la Shimonoseki Pakto. Ĝi havis antaŭmilitan negociferon de \$300,000.

Kiangling, aliflanke, estas pli bone konata loko en ĉina historio. Ĝi fariĝis la ĉefurbo de la Reĝlando de Chu (722-481 A. K.), kiam Reĝo Ping de Chu translokis sian kortegon al Kiangling en 529 A. K. Ĝi fariĝis ĉefurbo de la Reĝlando de Liang en 552 A. K., k estis denove proklamita ĉefurbo de la ribelinta generalo Kao Chi-hsin ĉe la komenco de la 10-a jarcento.

Liu Pei pruntis Kiangling, tiam konatan kiel Kingchow, de la Reĝlando de Wu en 201 A.K., antaŭ ol li konkeris Szechuan. Por la posedo de Kingchow, la du reĝlandoj bataladis senĉese sur batalkampoj k en diplomaciaj konferencoj.

La norda punkto de la Hsiangyang-Fancheng-Tangyang-Ichang-Kiangling-Shasi triangula militareno estas la urb-duo de Hsiangyang k Fancheng. La distrikto estis unue konata en ĉina historio kiel la Markizejo de Fan, kreita de Imperiestro Hsuan de la Chou dinastio proksimume je 820 A. K. Ĝi estis sinsekve submetita al la reĝlandoj de Ts'in, Chu k Han. En la epoko de la Tri Reĝlandoj, 180-280 A. K., ĉina Milita Dio, Kwan Kung, estis tiam la garnizona komandanto de tiu ĉi distrikto. Li gajnis sian plej grandan venkon dronigante sep atakantajn armeojn senditajn de la Reĝlando de Wei en la Han rivero ĉe Fancheng.

En 360 P. K., tiu ĉi distrikto estis atakata de tribo el la nordo. Dum la batalo, la maljuna patriino de la prefekto, Chu Shu, kondukis siajn servistinojn k la virinojn de la urbo por helpi

## Unuigas Koreaj Naciistoj

Pli forta solidareco ektiviĝis en la vicoj de la koreaj naciistoj kun la lastatempa formiĝo de la Korea Sendependeca Partio.

La nove formita partio signas la amalgamigon de tri ekzistantaj partioj inter la koreaj revoluciistoj, la Korea Naciista Partio, la Korea Sendependeca Partio k la Korea Revolucia Partio.

Ta fondiĝo de la unuigita partio estis anoncita en manifesto lastatempe eldonita en Chungking. La tri antaŭaj partioj jam de kelkaj jardekoj batalis laŭ similaj linioj por la sendependeco de Koreio k la liberigo de la korea popolo el japana subpremado. Iliaj membroj estas disigitaj tra Koreio, Ĉinio, Eŭropo k Ameriko.

Depost la manĉuria incidento en 1931, unuecfroto estis formita de la tri partioj kun la celo restarigi la sendependecon de Koreio. En tiu ĉi unuecfroto estis inkluditaj ses diversaj organizoj de transmaraj koreoj en Usono. Tamen, la partioj administris siajn respektivajn aferojn sendepende unu de la aliaj, k nur kiam levigis grandaj problemoj de komuna intereso, iliaj respondeculoj konsiliĝis inter si.

Tial ke la ĉina-japana milito evoluas ĉiam pli favora al Ĉinio, k ke la fina venko de Ĉinio k la ekonomia disfalo de Japanio alvenos pli aŭ malpli frue, la tempo estas oportuna, diris la manifesto por la koreaj naciistoj k revoluciistoj formi inter si pli fortan unuecan fronton. Sekve estas la formiĝo da la Korea Sendependeca Partio.

Ĉiuj tri partioj ĉesos ekzisti kiel apartaj grupoj, k iliaj membroj nomigos la membroj de la pligrandigita partio. Organizoj de transmaraj koreoj interesataj en la liberiga movado de ilia patrolando estos envicigitaj en la nova partio.

La celo de la Korea Sendependeca Partio estos efektiviĝi per revolucio la falon de la japana regado k restarigi la kulturen, ekonomian, politikan k internacian pozicion de Koreio kiel libera k sendependa nacio.

La principoj de la partio konsistas en la konservado de la teritoria suvereneco k la starigo de la Repubiko de Koreio. La registaro de la respubliko estos starigita per popola elekto, k ĉiuj popoloj, sen distingo pri sekso, religio k klaso, estos rajtigataj partopreni en ŝtataferoj sur egala bazo. Ekstere, Koreio unuigos kun ĉiuj amikaj nacioj en komuna klopodo por mondopaco k homara prospero. (A. Verul)

defendi la urbon. Ili konstruis etendaĵon de ĉirkaŭ 200 futoj da urbmuo nordokcidente de Hsiangyang. La etendaĵo estas konata kiel la "Virina Urbo".

En 1217 P. K., alia nomada tribo provis puŝigi al Ĉinio laŭ la Han rivero. Garnizona komandanto Meng Chi gajnis decidan venkon k fiaskigis la malamikan planon. Hodiaŭ, unu el la urbopordoj de Fancheng estas ankoraŭ markita per la inskripcio: "Tio ĉi estis kie Meng Chi gajnis sian venkon."

Kiam la mongoloj batalis por la konkero de Ĉinio, ili ankaŭ prenis la Han-riveran vojon en

1257 P. K. La urb-duo estis tenata de trupoj de la Sung dinastio dum ses longaj jaroj. Fine, en la jaro 1273 P. K., Marco Polo, kiu estis tiam funkciulo ĉe la kortego de la mongoloj, konsilis la uzon de kanonoj en la atako. Jen la unuan fojon kanonoj estis uzitaj en ĉina milito, kvankam pulvo inventita de ĉinoj por fajrkrakaĵoj. Rezulte de la kanon-atako, Fancheng estis ekprenita de mongoloj k Hsiangyang estis kapitulaciita. Kaptinte tiun ĉi strategian punkton, la mongoloj postenigis fortan garnizonon de 20,000 mongolaj familioj en tiu ĉi distrikto. (A. Verul)

## “Malsupren Vi Iru!”

Mugas la motoroj de tri eskadroj da nigre-verdaj ĉinaj ĉasmaŝinoj. Ĉe la ekfluga linio, signal-flagoj svinge envicigis ilin. Unu post la alia ili ekflugis k cirkulis super la aerodromo, ĝis ili ekprenis formacion 1,000 metrojn en la aero. Baldaŭ ili malaperis en la nebula ĉielo de 5,000 aŭ pli da metroj.

La okuloj de la junaj k fortaj aerpilotoj turniĝis al la horizonto, serĉante nigrajn makulojn en la brilego. Kelkaj el ili estis veteranoj de la tempo de la Shanghai-Nanking aerlukto. Kelkaj estis juaĵ “falkoj” kiuj ĵus ricevis siajn flugilojn el la aviada akademio. Sed veteranoj aŭ “junaj falkoj”, ili ĉiuj estis pretaj provi sian forton kun aerlegio de 117 japanaj pezaj bombaeroplanoj kiuj en kvar grupoj destiniĝis por disŝuti fajron, detruon k morton sur Chungking je junio 12.

“Flowery” k “Sissy Liu” gvidas siajn du eskadrojn flugante en la nuboj sude de Chungking, kiam la unua grupo de 36 japanaj aeroplanoj vidiĝis proksimigante al la ĉina milittempa ĉefurbo. “Flowery” svingis siajn flugilpintojn k direktis suden la nazon de sia aer-ŝipo. Kun la spirtubo vaste malfermita, li gvidis siajn “aer-kavalirojn” en la unua albatato.

Tio estis fronta atako. “Flowery” duone kliniĝis, forte mallevigis, k premis la elektran kontrolilon per sia malgranda fingro. Maŝinpafilaj kugloj ekpluvis sur la malamikan eskadronvidanton. Lia ekrigardo diris al li ke la unua pafaro enĵetis plurajn ŝtal-kuglojn k eksplodobusojn en la korpon de la dumotoran japanan aerŝipon. Estis nenia videbla rezulto. Anstataŭe, estis pluvo da kugloj el japanaj maŝinpafilaj k bombardiloj.

Aliaj ĉinaj maŝinoj ankaŭ alvenis la japanan formacion, suben saltis, ekpafis, k sin for-

portis bonorde. Alia atako sekvis, kiam la ĉinaj maŝinoj levigis post la unua malleviĝo kun siaj nazoj direktataj al la vostoj k ventroj de la malamikoj. La du atakoj devigis al la malamikoj malpleniĝi sian mortigan ŝarĝon sur la riveron k ties bordojn, antaŭ ol la bombardistoj povis trovi ion difinitan kiel celajon.

“Sissy Liu” faris alian provon albatati la malamikan gvidanton. Li tenis sin 500 metrojn for de la malamika vosto. Poste 300 metrojn. Pli poste 150 metrojn. Liaj pafiloj komencis salvon. Malamikaj kugloj siblas ĉie ĉirkaŭ li. Lia dekstra piedo sentis varmegon. Kiam li forkondukis sin, li trovis sian piedon sanganta. Li faris piedbaton k trovis sian piedon ankoraŭ kapabla kontroli la direktilojn. Li grimacis.

La cetero de la malamika legio sin alpremis. La tri ĉinajn eskadrojn enfermis malamikaj maŝinoj, kugloj k obusoj. Ili sin klinis, suben saltis, turniĝis, k supren grimpis. Ili atakis k reatakis. Dum pli ol unu horo ili estis apud la vostoj k ventroj de la malamikaj aerŝipoj. Ili vidis ke kelkaj el la malamikaj aerŝipoj posttrenas liniojn da fumo. Ili vidis ke aliaj malaltiĝas. Sed la malamikaj aerŝipoj ankoraŭ rifuzis turniĝi pli k diskrevi.

Subleŭtenanto Chen Mengkun estis furioza. Li alprenis pli rektan atakmanieron. Kun la spirtubo de sia maŝino vaste malfermita, li alrapidis malamikan ŝipon k decideme puŝegis sian propran aeroplanon kontraŭ la malamika maŝino. Ĝia tute-metala fluglo estis frakasita, k la malamiko falis al sia detruo. Chen, kun la malsupra maldekstra flugilo de sia biplano forskuita, manovris gliti malsupren k fari malglatan surteriĝon sur sian hejman kampjon. Li estis ekzamenanta la kugltruojn k la disŝiritan flugilpinton

de sia aeroplano kune kun sia mekanikisto, kiam liaj ceteraj kamaradoj surteriĝis unu post la alia, multaj kun kugl-truoj sur siaj aerŝipoj.

La komandanto grimacis, kiam li informis ke sep malamikaj ŝiprompaĵoj vidiĝis survoje al sia bazo. Tio estis 7-a venko.

Dume, “Sissy” suriris ambulanco rapidante al la hospitalo. “Atendu min,” li mansvingis al siaj kamaradoj, “mia estas vundeto, k mi partoprenos morgaŭ.” Fidela al sia promeso, li estis denove en sia ŝipo patrolante super Chungking, kiam la Ĉina Aerforto bone batalis je la 16a.

Alia aerlegio de 117 japanaj pezaj bombardmaŝinoj en kvar grupoj atakis Chungking je la 16a. Vetero estis varma. Ĉe 5,000 metroj k pli supre estis iom da naĝantaj nuboj. Ĉinaj eskadroj cirkulis ĉirkaŭ ili, pretigante kaptilon por la japanaj atakantoj.

Nelonge post 1 p.m., la malamikaj aerŝipoj alproksimigis de la sudokcidento. La formacio estis en bona ordo. La bombardistoj interne celas laŭ la vidiloj. La pafistoj preme tenas siajn fingrojn sur la ellasiloj.

El nubtruo suben saltis du ĉinaj ĉasmaŝinoj. Iliaj maŝinpafilaj ĉiuj celis al la japana eskadronvidanto. Tiu ĉi lasta devis evite ti. Tio jam sufiĉis por rompi la formacion. K ĉinaj batalantoj kirliĝis malsupren por ilin ataki.

Subleŭtenanto Peng Chun manovris sian aerŝipon en ĝustan pozicion. Li ekvidis la grandan voston de japana aeroplano en sia vidilo. “Malsupren vi iru!” Lia maŝinpafila salvo sendis la malamikan aviadilon al la suda bordo de Chungking. La orangkoloraj flamoj postlasis vidindan fuman voston en la nebula ĉielo. K Chungking-anoj observis proprakoke la subenfalon de monstro veninta por morton disŝuti sur ilin.

Sed Peng Chun ne vidis ĝin longe. Kiam li estis provanta direkti sian nazon al la dua japana maŝino por alia atako lin

# LITERATURO

## BORDO TRANSMARA

*Su Ĉjun*

Fine li atingis sian celon—  
asasini iun japanan generalon de  
li malamatan. Li devis rifuĝi,  
sed antaŭ ol ekiri la longan kaj  
solecan vojon, li volis vidi sin  
lastfoje, kiu dediĉis sian tutan  
vivon al li je sia propra malfeliĉo,  
—la patrino.

Akompanate nur de sia propra  
ombro li staris mute ĉe la  
silenta marbordo. En tiu mo-  
mento la tuta universo ŝajnis al  
li malplena, kvazaŭ nur li sola  
troviĝus en ĝi, kvazaŭ li estus la  
unika heredanto de P' homaro.  
Li lasis sin droni en la nigra  
mantelo de P' nokto, sentante  
malklare ke li komplete pereas  
en neniecon. Li apenaŭ konsciis,  
pri la nokto, kiu envolvas lin.  
Li lasis la alkurantajn ondojn  
lavludi kun siaj piedoj, li indi-  
ferentis pri la lian veston malse-  
kigantaj pluveroj. En tiu mo-  
mento li preskaŭ forgesis la su-  
ferojn, kiuj tiel konstante turmen-  
tis lin ĝis antaŭ kelkaj minutoj.

Li estis filo de iu korea no-  
belo. Li povis libere enpaŝi la  
Reĝan Palacon Ĉang Dok en la  
pasintaj tagoj. Iam en la pasinto  
li ĝuis ekstaze la klasikan kon-  
certon de la palaco. Li ankoraŭ  
konservis en sia bela rememoro la

kaptis hajlo da malamikaj  
kugloj. Li falis k diskrevis. Li  
interŝanĝis sian vivon por sep  
malamikoj.

Lia morto estis rapide ven-  
ĝita de siaj kamaradoj. Unu post  
alia kvin malamikaj aerŝipoj estis  
paffaligitaj.

Dum vespermanĝo la koman-  
danto tostis per glaso da akvo al  
la malplena sidloko antaŭe oku-  
pita de Peng Chun, k solene  
deklaris: "Ni jam venĝis vian  
sinoferon hodiaŭ per ses mal-  
amikaj aerŝipoj. Ripozo vi en  
paco!" (S.M.)

fieron kaj gloron de la nacia pra-  
avo Dangun. Tamen, ĉio ĉi estas  
nura sonĝo hieraŭa, malpreciza  
kaj nerevidebla.

Eble pro sia denature dotita  
saĝo kaj kuraĝo li ĉiam ŝatis riski  
sin al vivaventuroj. Lastatempe  
li serĉadis la dispelitan animon  
de sia patrolando. Li ne povis  
toleri pasive la fatalan sorton de  
la patrolando kun la falo de Li  
Dinastio.

Lia familio mem poiome fa-  
lis en malprosperon kune kun la  
sorto de P' patrolando. Ĉe li  
restis nur kelkaj kabanetoj kaj  
pecetoj da kampo—la lastaj signoj  
de P' pasinta prospero. Sed eĉ  
tian feliĉon malhavas la nuntem-  
paj koreanoj, li devus honti kiel  
sinjoraĉo inter almozpetantoj!

La tuta lando nun ne plu  
malfermis al li sian sinon tiel  
afable kiel en la pasinta tempo.  
Feliĉe, li tamen ne perdis sian  
patrino, kiun li atendas nun  
ĉiunmomente ĉe la marbordo.

Nun ŝi estis jam piedtretita  
maljunulino, spite sian nobelan  
devenon. De sia junaĝo ĝis sia  
nuntempa velkiĝo ŝi eldrinkis la  
dolĉ-amaran vinon de P' vivo laŭ  
la tempopaso inter la prospero  
kaj falo de la patrolando. Nun  
ŝi havis ĝuste sesdek jarojn. Dum  
tiuj longaj jaroj ŝi naskis kvin  
infanojn kaj vidviniĝis post la  
akuo de la lasta infano. Kvan-  
kam ŝi estis ankoraŭ juna, ŝi ne  
reedziniĝis por pasigi pli komfor-  
tan vivon. Ŝi eltenis ŝian suferon,  
nur esperante, ke iam en postaj  
tagoj, kiam plenaĝigos la infanoj,  
ŝian longan penadon rekompencos  
eventuala feliĉo. Sed tamen la  
sorto mem estas apenaŭ kompre-  
nebla afero. Fortuno restis ĉiam  
indiferenta pri ŝi, kvazaŭ ŝia sorto  
estus sigelite de malbena. Ŝi for-  
perdis kvar infanojn aŭ en karce-

ron, aŭ sur pendigilon, aŭ simple  
en malaperon. Nun denove ŝi  
devis perdi sian lastan filon. Post  
ĉifoja apartiĝo ŝi estis restonta  
sola senhelpe ĝis sia entombiĝo.

Tiele apartiĝas ofte la koreaj  
filoj de sia patrino. Al ili man-  
kis okazo ĝui parencajn sentojn,  
la familian vivon. Ne mirinde,  
ke jam de dudek jaroj disaŭdiĝas  
la trista kaj melankolia kanto  
"Arirang"\* en ĉiu angulo de P'  
lando:

«Arirang, arirang, ara-  
rijo,

Arirang-pasejon ni iru  
kune.»

La marbordo ĵetis certan  
konfuzon, obskurigite de la nokta  
nigro kaj pluvo-vento. La ĉielo  
kaj maro aglomeriĝis en densan  
mallumon, en kiu pereis la pej-  
zaĝo kun ĉiuj vidaĵoj. Nur la  
frapantaj pluvgutoj batadis kiel  
ŝutantaj sagoj. Rapidis en neko-  
natan lokon la muĝo de P' mar-  
vento. Sub la vento kaj pluvego  
li eksentis profunde la kruelan  
persekuton, de P' aŭtuna nokto.

Tra la mallumo li ekvidis  
nigran silueton almoviĝantan. Pos-  
te li kolektis sian propran nomon  
mallaŭte timtremantan. Apenaŭ  
kiam la voĉo atingis liajn orebran-  
dojn, li jam sin puŝis antaŭen  
kaj sin ĵetis fulme al la vokanto  
—la patrino.

Li tamen mutis kontraŭna-  
ture. La patrino larmis. Ĉu la  
silento kaj larmado estis al ili  
adiaŭvortoj? Ambaŭ ili ĵetis sian  
rigardon trans la maron, kvazaŭ  
atendus ilin la libero, feliĉo, kaj  
realiĝus iliaj aspiroj sur la alia  
flanko de P' maro, kie kuniĝas  
la ĉielo kaj maro.

«Ĉu tie estas Ĉinio?» fine  
ŝi rompita la silenton post longa  
rigardo trans la maron. Li nur  
kapiĉis mute.

«Ĉu vere vi foriros tien mor-  
gaŭ?» ŝi demandis.

«Jes, panjo, jam morgaŭ.»

«Ĉu vi sola?»

«Panjo, mi bedaŭras, ke mi  
ne povas iri kun vi. Vi ja scias,  
ke la vojo ne estas tiel glata.»



Jes, la vojo tra Arirang-mont-pasejo estas malfacila, eĉ se ĝi estus pavimita per marmorol

Subite ŝi eksentis, ke ŝi restas sola, ke la filo jam foriris trans la maron. Granda kaj vasta estas la maro, kie do povas esti la loko por revidiĝi? La larmoj kaŝitaj en ŝiaj okulkadroj elruliĝis nedetenite. Ŝi ploris..... Ŝi sentis sin malfortiganta. La kruroj malmoligis, ili apenaŭ povis subteni la pezan korpon. Ŝi apogis la kapon al la brusto de la filo. Ŝi elprenis la naztukon kaj forviŝis la larmojn.

«Panjo, estu trankvila. Iam vi povos veni al mi aŭ mi revenos por revidi vin. Kiel ajn, ni nepre havos okazon kunesti.....»

«Mi estos kontenta, se mi povus iam rigardi vin unu fojon plu antaŭ la morto.....» Ŝi ploris pli kortuŝe, estante tute malcerta pri sia deziro.

«Panjo, ne ploru! Panjo, mi timas, ke oni aŭdos vian ploron. Jam ĉesu plori, panjo, kaj donu al mi la naztukon.»

Ŝi donis ĝin obeeme al la filo, penante deteni la ploron ĝis lia foriro.

Pasis du tagoj de post la foriro de la filo. Ŝi jam skribis mallongan leteron por sendi al sia filo poste, kiam ŝi eksciigos pri lia adreso. Tagoj pasis, jaroj kuris for, sed la mallonga leteronieniam trovis okazon forekspediĝi, vagante la tutan landon kun sia aŭtorino. Intertempe oni konfiskis ŝiajn kampetojn kaj kabanejojn, kondamnante ŝin la «patrino de la imperia perfidulo». Ŝi estis neglektita de siaj parencoj kaj amikoj, kiuj rigardis ŝin kiel simbolon de katastrofo. Ŝi sentis sin soleca, ŝi sentis, ke la tuta mondo turnis sin de ŝi. Nur la leteroj sola ĉiam akompanis ŝin:

«Mia filo! Vi foriris, lasante min sola en la lando plena de malico. Sed ne skrupulu pri mi, min koncernas nur via sano. Mia amo restos kun vi por ĉiam, eĉ ĝis kiam plenkreskos sovaĝaj herboj sur mia tombo. Mi ĉiam diris, al vi, ke mi estas ankoraŭ tre juna por vidi pli belan eston-

ton, ĉu ne? Ĉu estos al mi okazo revidi vin? Nur unu fojo sufiĉas. Post tiam mi adiaŭos vin por eterne. Mi sopiregas al via respondo. Diru al mi kelkajn vortojn pri vi, tion vi ja devas fari.

Via amatapanjo.»

La koverto kaj la leterpapero kun ĝia skribaĵo fariĝis tute malnova, kiam la adresito ricevis ĝin. Nur la adreso estis nove skribita, krom kelkaj vortoj aldonitaj:

«Pro mia malsano mi ne povas reskribi la leteron. Tial mi sendas la unuan leteron. Mi ne kulpigas vin pri via longa silento. Ne ĝenu vin, la patrino koro estas ĉiam tolerema al sia filo. Mi kredas, ke vi jam skribis al mi multajn leterojn, kvankam mi ricevis neniun, krom la lasta, kiun vi konfidis al via amiko. Momente mi nur esperas, ke la korespondado interrompiĝos en nenia okazo.»

La letero —krom aldonitaj vortoj—restis nekorektita en la origina formo. La korektita dato konstatigis, ke la tempo pasis jam dek longajn jarojn.

Post la trailego en la kapo de la filo ondumis rememoroj, kiel la tajdo alkuranta ĉe la marbordo antaŭ lia foriro de lia patrolando. Tamen certa ĝojo miksigis kun lia sentimentala humoro. Li ĝemis, sed li ree konciigis pri la malvarma realo; homo ju pli proksimiĝanta al sia celo des pli foriĝas de sia familio.

De tiu tempo li daŭrigis la korespondadon seninterrompe. La plej freŝdata letero diris al li, ke ŝi ne havas multe da tagoj por vivi, kaj ke ŝi deziregas revidi lin antaŭ sia morto.

Fine la filo konsentis la emocio venkis lin. Tamen ĝuste en tiu tempo la venenaj ungoj de japanoj etendiĝis al ĉiu angulo de Ŝanhajo, kio pelis lin en subteran vivon.

Venis la tago de ŝia alveno. La filo iris al la kajo por atendi ŝin. Li ekvidis inter la svarmantaj pasageroj maljunan virinon kun la sulkoplana vizaĝo kaj la

neĝblanka hararo. Ŝi apenaŭ paŝis apogite al la bastono. Li ekkonis ŝin sia patrino. Tiam li sentis sian koron disŝiriganta, li emis kuri al ŝi por helpi. Sed la racio retenis lin. Li ne povis sin montri al ŝi, kiun sekvas japanaj spionoj por utiligi ŝin en la serĉado de asasininto—ŝia filo.

Tamen li sukcesis trovi la hotelon, kie loĝas la patrino. Post tri tagoj, riskante ĉiun dangeron, li ŝteligis en ŝian ĉambron.

Estis noktomezo. La patrino kuŝis malsana en la lito. Post longa sopirado ŝi perdis paciencon kaj esperon revidi sian filon. Ŝi plorĝemis, kvazaŭ ŝi jam repentus pri sia ĝisnuna vivo.

«Panjo, mi venis,» li flustris treme.

Momente la voĉo sonis al ŝi kiel sonĝo, sed ŝi ne plu povis dubi, ŝi baraktis por sin levi, palpserĉante la filon tra la nigra mallumo.

«Knabo, kie vi estas? Jen estas miaj manoj, lumigu la lampon, por ke mi povu rigardi vin.....»

Sed al li lumo estis kondukilo al teroro, al morto!

«Tuj.....alumeton!» ŝi kriis histerie.

Sed eĉ alumetlumeton li ne povis toleri. Tial dum la momenta renkonto ŝi aŭdis nur kelkajn frazfragmentojn de la filo, ne povante vidi lian vizaĝon, kiun ŝi sopiregis tiom da jaroj!

«Venu denove morgaŭ matene,» ŝi petis patoŝe, «kaj nur preterpasu antaŭ la fenestro, tiel ke mi vidos vin tra la fenestro.....nur unu fojon.....»

La filo konsentis kaj la postan matenon li preterpasis antaŭ la fenestro tien kaj reen kelkajn fojojn. Sed strange, li ne povis vidi ŝin tra la fenestro. Ia malagraba antaŭsento frapis lin subite. Li enkuris la hotelon kaj aldemandis unue renkontitan serviston pri sia patrino. Oni respondis al li, ke la maljunulino jam mortis antaŭ la tagiĝo!

*Elĉiniĝis Lujlang*